

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por $\frac{1}{2}$ jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por $\frac{1}{32}$ de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 9.

Nurnbergo, Septembro 1891.

Jaro II.

La plej proksima estonteco.

En la No 8 de nia gazeto ni presis projekton de „Akcia Societo Esperantista“. Ni esperu, ke la „projekto“ baldaŭ fariĝos „fakto“; sed la tempo estas ankoraŭ tro mallonga, por ke ni nun povu jam scii la rezultatojn, kiujn nia projekto donis. Jam nun*, kiel oni povis facile antaŭvidi, la vasta projekto elvokis de la flanko de kelkaj amikoj diversajn demandojn kaj dubojn tuŝante diversajn apartajn punktojn de la projekto. Staras tute ekster dubo, ke la principo de la projekto, t. e. la intenco fondi per komunaj fortoj fonton, kiu donadus almenaŭ 5000 rublojn ĉiujare por la vastigado de nia afero, nenie trovos ian kontraŭparolon. Kontraŭparoloj povas nur veni: 1) kontraŭ la konstruo kaj la programo de la Societo kaj kontraŭ diversaj apartaj detaloj; 2) kontraŭ la efektivigebleco de la Societo. La unua punkto, kiel ajn grava ĝi ŝajnas je l'unua rigardo, en efektivo ne havas grandan signifon. Ne parolante jam pri tio, ke la motivoj, kiuj ĝis nun estis prezentataj kontraŭ tiu aŭ alia detalo de la projekto, estas facile redefendebaj, ni supozos eĉ, ke poste en la projekto eble estos trovitaj gravaj eraroj, kaj kontraŭ tia okazo ni rimarkas, ke la detaloj estos facile bonigeblaj kaj ŝanĝeblaj per la decidoj de la Societo mem. Nia programo devas nur difini la vojon por la unua tempo; sed de la momento, kiam la Societo fondiĝos, la rajto de decidado en ĝiaj aferoj transiras al la membroj, kiuj per voĉdonado povas ŝanĝi ĉion, kion ili trovas nebona. Grave estas por ni nur fondi kolegaron, kiu prezentus sufiĉan komunan forton, por garantii la estontecon de nia afero; sed uzi sian propran forton en tiu aŭ alia maniero estas jam afero de la kolegaro mem. Kun tiu sama ĝojo, kun kiu ni vidus la efektivigon de nia projekto, ni salutis ankaŭ Societon kun ĉiu alia programo, se la rezultatoj de ĝia laborado promesus esti tiaj samaj. Eĉ se unu sola persono volus tute laŭ sia propra programo krei kaj finance certigi ian konstantan fonton por nia afero, ni salutis ĝin kun ĝojo, — tiom pli, kompreneble, neniuj povus al akcia Societo malpermesi aranĝi siajn aferojn laŭ sia propra bontrovo.

Multe pli grava jam estas la dua punkto — la efektivigebleco. Ĉu ni havos nun sufiĉe da forto, por krei Societon en tiu mezuro, pri kiu ni parolis en nia projekto? La venontaj monatoj donos respondon je tiu ĉi demando. Estas tute sendube, ke se ni povos atendi kaj elteni, la bezonata forto pli aŭ malpli frue kolektiĝos, ĉar ĉiu nova peco da tempo alportos al nia afero novajn amikojn kaj grandigos

* Al kelkaj amikoj ni komunikis la esencon de la projekto ankoraŭ antaŭ ol ĝi estis presita.

nian fortojn. Ĉar la demando estas pure financa, tial la jesa respondo en nia kreskonta afero dependas nur de la tempo. Se la sufiĉa forto por krei nian Societon ne kolektiĝos en unu monato, ĝi kolektiĝos en du monatoj, en tri monatoj, en jaro, aŭ fine en kelkaj jaroj. Tamen ni ne povas senzorge lasi la respondon tute al la estonteco; ĉar se la efektivigo de la Societo tro prokrastiĝos (aŭ el kaŭzoj pure financaj, aŭ el neeblo tiel baldaŭ konsentigi la diversopiniajn partoprenontojn por ia unu difinita programo), tiam nia afero povus dume pereji el manko de fortoj kaj el neeblo finance sin teni. Sekve la prudento ordonas al ni: pacience atendi kaj kolekti iom post iom financajn fortojn por la fondota Societo, preparoli kaj peni alkonduki al ia konsento la diversajn opiniojn pri la konstruo kaj programo de la fondota Societo, sed — la plej grava — dume provizore certigi la regulan senhaltan iradon de nia afero ĝis la tempo, kiam la Societo fondiĝos. Ni esperu, ke la Societo fondiĝos jam post kelkaj monatoj, sed ni estu preparitaj ankaŭ por la okazo, se la fondiĝo eble prokrastiĝos tro longe.

Por provizore certigi la regulan iradon de nia afero en la plej proksima estonteco, t. e. ĝis la projektita Societo fondiĝos aŭ ĝis nia afero en ia alia maniero ricevos firman fundamenton sub la piedoj, ni agas en la sekvanta maniero:

Ni ellasos 200 „Kartojn Fondantajn“ kies celon kaj signifon oni povas vidi el la malsupre donita teksto de la kartoj mem. Nun ni nur turnas la atenton de niaj amikoj, ke ĉiu el tiuj 200 kartoj postulas de sia posedanto nur la pruntadon de tre sensignifa sumo de 1 rublo ĉiumonate; la kartoj sekve neniu ŝarĝos kaj dume ili tute certigos la estontecon de nia afero. Ni povus nin kontentigi je nur 150—160 kartoj, tamen ni ellasos la rondan sumon de 200, en la antaŭvido, ke eble parto de la posedantoj estos neakurataj en la pagado. Ni petas ĉiun el niaj amikoj skribi al ni kiel eble plej baldaŭ, ĉu li volas ricevi „kartojn fondantajn“ kaj kian nombron li volas ricevi. Kiam la nombro de la mendoj atingos la altecon de 200 kartoj, tiam ni presos la kartojn, dissendos ilin al la mendintoj kaj petos alsendi al ni pagon por la unua monato.

Ni atentigas ankaŭ, ke la sistemo de la kartoj fondantaj tute ne devas malhelpi al la fondiĝo de la projektita Akcia Societo, por kiu la sistemo de la kartoj estas nur provizora prepariĝo kaj ne io aparta kaj nova. La mendadon de la akcioj la amikoj povas kuraje daŭrigi en tiu sama alteco, en kiu ili volis ĝin fari antaŭ la sistemo de la kartoj, kaj ili ne devas timi, ke parto de ilia mono nun estos okupita en ia alia maniero: ĉar kiam la nombro de la subskribitaj akcioj atingos la necesan altecon, tiam la fondiĝonta Societo

antaŭ ĉio devos elaceti la kartojn fondantaj kaj la tuta mono de ĉiu denove fariĝos tute libera por la aĉeto de la menditaj akcioj.

La provizora sistemo de la kartoj, tute ne malhelpante al la eble ankoraŭ malproksima fondiĝo de la Societo, donos al ni la eblon regule konduki nian aferon en la plej proksima estonteco kaj donos al ni ankaŭ sufiĉe da tempo por bone pripensi kaj preparoli, ĉu estas konsilinde fondi la projektitan Societon kaj en kia formo oni devas ĝin fondi, aŭ ĉu oni devas resti ĉe la nuna ordo.

Jen estas la formo kaj la enhavo de la „kartoj fondantaj“:

Karto Fondanta

de la

Lingvo Internacia Esperanto.

N^o

La posedanto de tiu ĉi karto promesis pagadi ĉiumonate al la eldonanto de la gazeto „La Esperantisto“ (komencante de la dato, presita en la fino de tiu ĉi karto) unu rublon kaj akurate daŭrigadi tiun ĉi pagadon ĝis la tempo, kiam la afero Esperanto staros forte sur propraj piedoj, t. e. kiam la nombro de la pagantaj abonantoj de „La Esperantisto“ atingos la altecon de unu milo. (Rimarko; La posedantoj de la kartoj fondantaj ricevas „La Esperantiston“ senpage; la kosto de „La Esperantisto“ por ĉiuj aliaj personoj restas 2 rubloj por jaro; se la posedantoj de la kartoj fondantaj deziras, ili havas la rajton postuli (per voĉdonado, kalkulante unu voĉon por ĉiu karto), ke la kosto de „La Esperantisto“ estu nur 1 rublo por jaro; sed tiam la pagado por la kartoj fondantaj devos daŭri ĝis „La Esperantisto“ havos 3000 abonantojn. De la tago, kiam „La Esperantisto“ ricevos la 1000 an abonanton (aŭ ĉe la kosto de 1 rublo ĉiujare — la 3000 an), la pagado por la kartoj fondantaj ĉesigos, ĉiu posedanto de tia karto sendos ĝin al la eldonanto de „La Esperantisto“ kaj ricevos anstataŭ ĝi por eterna memoro ateston, ke li estas „unu el la fondintoj de la afero Esperanto“. Samtempe kun la disdono de la atestoj eliros prese „ora libro de la afero Esperanto“, en kiu estos priskribita por eterna memoro la tuta historio de la fondiĝo kaj firmiĝo de la afero Esperanto kaj estos presitaj la nomoj de ĉiuj personoj, kiuj per regule pagataj kartoj fondantaj prenis parton en la firmiĝo de la afero (t. e. la nomoj de la posedantoj de la atestoj) kaj ankaŭ la nombro de la kartoj, kiujn ĉiu aparta partoprenanto prenis en la komenco sur sian riskon kaj respondecon.

La kartoj fondantaj estas sennomaj (sed la adreso de la posedantoj devas ĉiam esti sciataj al la eldonanto de „La Esperantisto“) kaj povas transiri el unuj manoj al aliaj; la nomajn atestojn ricevos tiuj personoj en kies posedo la kartoj sin trovas en la momento de la ĉesigo de la pagoj.

Al tiuj posedantoj de la provizoraj kartoj, kiuj forĝis alsendi sian pagon (en la komenco de ĉiu monato), la redakcio de „La Esperantisto“ sendas memorigon en la fino de la monato kaj en okazo de bezono ankaŭ duan memorigon en la fino de la sekvanta monato. Karto, por kiu la posedanto ne pagis malgraŭ la dufoja memorigo, perdas sian forton, estas elstrekata el la nombro de la provizoraj kartoj kaj la tuta mono enportita por ĝi estas perdata. Kvitancoj pri la rice-

vitaj pagoj estos ĉiumonate donataj en „La Esperantisto“. Kiu deziras, povis sendi la pagon antaŭe por kelkaj monatoj per unu fojo.

La mono, kiun la posedantoj de la kartoj fondantaj ĉiumonate alsendas, estas nur prunto, kiu kun la tempo devas esti plene repagita (kun 5%) al la pruntintoj en la sekvanta maniero:

En la fino de ĉiu jaro en „La Esperantisto“ estos presataj la nomoj de ĉiuj abonantoj kaj la tuta sumo de la mono, kiun la redakcio ricevis de la abonantoj. La tuta sumo estas uzata por repagi la pruntojn al la posedantoj de la kartoj fondantaj, en tia maniero, ke la tuta sumo estos dividata je 200 egalaj partoj (laŭ la nombro de la ekzistantaj „kartoj“) kaj la posedanto de ĉiu karto ricevos unu tian parton. Tiu ĉi ĉiujara repagado daŭros tiel longe, ĝis la posedantoj de la kartoj fondantaj ricevos returne la tutan sumon da mono, kiun ili enportis en la tuta tempo, kune kun 5% da gajno de la enportita sumo. Kiam la nombro de la abonantoj de „La Esperantisto“ atingos 1000 (sekve kiam la ĉiumonataj pagoj por la kartoj ĉesigos), tiam la enspezoj de la unuaj 1000 abonantoj estos uzataj por kovri la kurantajn elspezojn de „La Esperantisto“ kaj nur la abona pago de ĉiuj ceteraj abonantoj (super 1000) estos uzataj por repagadi al la posedantoj de la kartoj fondantaj.

Transdoni „La Esperantiston“ al ia alia persono aŭ al ia Societo la nuna kondukanto de tiu ĉi gazeto povas nur tiam, se tiu ĉi nova persono aŭ Societo antaŭe repagos (kun 5%) al la posedantoj de ĉiuj kartoj fondantaj la tutan sumon, kiun ili enportis en la daŭro de la tuta tempo.

Respondecon por la akurata plenumado de ĉio, kio estas dirita en tiu ĉi karto, prenas sur sin la aŭtoro de la lingvo Esperanto, L. Zamenhof.

La

1891

Subskribo de la
eldonanto de „La Esperantisto“:

Al ĉiuj, al kiuj nia afero estas efektive kara, ni turnas nin kun la voko kaj peto: faru ĉion, kion Vi povas, por ke la 200 kartoj fondantaj estu kiel eble plej baldaŭ disprenitaj. Ni ne esperas, ke ni povos tiel baldaŭ trovi 200 apartajn personojn por la kartoj; tial ni estos tre dankaj al tiuj amikoj, kiuj prenos por si pli grandan nombron da kartoj, kiujn ili poste jam de si povos forvendi al siaj konatoj (aŭ al fremdaj nove venontaj amikoj, per la helpo de „La Esperantisto“), se ili ne volas konservi ĉiujn por si mem. Memoru, amikoj, ke ĝis la kartoj fondantaj estos disprenitaj, nia afero pendas en la aero kaj devus vole-ne-vole kelkan tempon ripozi; sed de la tago, kiam la 200a karto fondanta estos mendita, nia afero estos certigita por eterne!
L. Zamenhof.

Al la akcia projekto.

Sinjoro W. H. Trompeter alsendis al ni la sekvantan projekton, kiun li proponas akcepti anstataŭ nia projekto presita en No 8. Nian propran opinion pri tiu ĉi projekto ni retenas ĝis alia okazo; dume ni presas la projekton kaj petas la amikojn diri al ni ilian opinion pri ĝi.

„La societo fondas librejon en Varsovio kun agentejoj

en Nurnbergo kaj iom post iom en aliaj lokoj, kie estos kluboj de esperantistoj. La librejo eldonados:

a) „La Esperantiston“ en la ĝisnuna formo aŭ en formo de „Reform“ (16 paĝoj en grandeco de ordinara libro); la abona kosto estos ne pli ol 1,50 markoj (= ĉirkaŭ 75 kopekoj);

b) aliajn verkojn en aŭ pri la lingvo Esperanto, sed nur tre bonajn kun efektive universala graveco, kaj ilia kosto ne estos pli ol 0,30 markoj por 80 paĝoj en 8°; verkoj pli malgrandaj ol 80 paĝoj ne estos eldonataj; pli malgrandajn verkojn, kiuj jam ekzistas, oni devas kelkajn kunigi, se ili devos en la librejo esti vendataj kaj se ili devos esti nomataj en la Esperantisto;

c) verkoj en aliaj lingvoj estos vendataj kiel en aliaj librejoj, por esperantistoj kun rabato 20%.

La societo metos artikolojn kaj anoncojn en gazetoj, ĝi faros ĉion, kion ĝi povos fari praktike por la vastigado de la afero laŭ siaj rimedoj.

D-ro Z-f estos la direktoro de la societo kaj laboros por ĝi ne pli ol 4 horojn mezonombre ĉiutage. Li komisiros por la laboroj, kiujn li mem ne povos aŭ ne volos fari, unu bone instruitan lernintan libriston kiel sekretarion. La salajro de tiu ĉi lasta, eble 1800 markoj, estos pagata el la kaso de la societo. La agentoj en aliaj urboj ricevos nur procentojn de iliaj enspezoj por la societo.

La posedaĵo de la societo konstistas en 100 ideaj partoj, prezentataj per 100 atestoj kun nomoj de la posedantoj. Por ĉiu parto (atesto) oni pagos ĝis la komenco de 1892 100 markojn. Pri la partoj la sekretario kondukos libron.

En Oktobro 1892 estos konferenco por konkludi pri plua ago kaj alpagoj; loko — plej oportuna por la plej multaj societanoj; voĉdono laŭ nombro da partoj; anstataŭigo per alia societano kun simpla skribita komisiro estos permesita.

Kiam la societo estos repaginta al siaj societanoj la enpagitan kapitalon kun 5 procentoj jaraj, tiam la societo ĉesos ekzisti kaj D-ro Z-f heredos ĝian tutan proprajon.

Al sia projekto sinjoro Trompeter aldonas ankoraŭ, ke de tia societo li persone prenis 20 partojn.

La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.
(Daŭrigo.)

„Certe“, respondis sinjoro Britain en plena ĝuado de la pipo, en la stato kiam la fumanto povas malfermi la buŝon nur tre malmulte por paroli, en oportuna trankvileco sidas sur sia seĝo kaj povas turni al sia kunsidanto nur la okulojn kaj ankaŭ tiujn ĉi tre malrapide kaj serioze.

„Ho, mi estas al vi tre danka, Clemency, tion vi ja scias!“

„Dio, kiel bela estas la penso pri tio ĉi!“ diris Clemency.

„Vi scias, mi faris diversajn esplorojn pri tio kaj alia“, daŭrigis sinjoro Britain kun la peza seriozeco de saĝegulo, „ĉar mi ĉiam havis spiriton scieman kaj legis multajn librojn pri la bonaj kaj malbonaj flankoj de la teraj aferoj, ĉar mi en mia juneco min okupadis je la literaturo.

„Efektive!“ ekkriis mirante Clemency.

„Jes“, diris sinjoro Britain; „du el miaj plej bonaj jaroj mi staris post la pordo de butiko de antikvajisto, preta postkuri, se iu metus ian libron en la poŝon; poste mi estis disportanto ĉe modistino, kaj en tiu ĉi ofico mi en vakstolaj paketoj alportadis al la homoj nenion ekster trompaĵo kaj malveraĵo — per kio mio animo estis malĝojigita kaj mia konfido je la homa naturo estis detruita. Kaj post tio mi tie ĉi en tiu ĉi domo aŭdis multe da parolado, kiu mian animon ankoraŭ pli malĝajigis; kaj post tio ĉi mia opinio estas, ke kiel certa kaj agrabla kvietigisto de la animo kaj

bona kondukanto tra la vivo nenio estas pli bona, ol la kribrilo de muskato.“

Clemency volis ion aldoni, sed li antaŭvenis al ŝi.

„Ligita“, li serioze aldonis, „kun fingringo“.

„Faru kion vi volas, kaj cetere, ne vere?“ rimarkis Clemency, en la ĝojo pro la konfeso metante unu brakon trans la duan kaj karesante al si la kubuton.

„Tia kerna diro, ne vere?“

„Mi cetere ne scias“, diris sinjoro Britain, „ĉu oni povus ĝin nomi vera filozofio. Mi iom dubas tion ĉi; sed ĝi bone eltenas kaj ŝparas multe da ĉagreno, kion la ĝusta filozofio ne ĉiam faras.“

„Rememoru nur, kiel vi mem ĉiafoje insultadis“, diris Clemency.

„Ha!“ diris sinjoro Britain. „Sed la plej rimarkinda estas, Clemency, ke vi min devis konverti. Tio ĉi estas la plej stranga. Vi! kio! mi pensas, ke vi ne havas duonon da penso en la kapo!“

Tute ne ofendigante, Clemency balancis la kapon, ridis kaj ĉirkaŭprenante sin diris: „ne, mi ankaŭ tiel pensas“.

„Mi estas sufiĉe konvinkita je tio ĉi“, diris sinjoro Britain.

„Ho mi, pensas, vi estas prava“, diris Clemency. „Mi elportas nenian penson, mi nenian bezonas“.

Benjamin prenis la pipon el la buŝo kaj ridis, ĝis la larmoj elkuris al li sur la vangojn. „Kiel naiva vi estas, Clemency,“ li aldonis ĉiam ankoraŭ ridante kaj viŝante al si la okulojn. Clemency, nenion kontraŭdirante, faris tion saman kaj ridis tiel same kore, kiel li.

„Sed mi tamen vin amas“, diris sinjoro Britain; „vi estas tre bona knabino en via speco; donu do al mi la manon, Clemency. Kio ajn estos, mi vin ĉiam estimos kaj ĉiam estos via amiko.“

„Efektive!“ respondis Clemency. „Nu, tio ĉi certe estas tre bone de via flanko.“

„Jes, jes“, diris sinjoro Britain kaj prezentis al ŝi la pipon por elbati; „mi vin ne forlasos. Aŭskultu! estas stranga bruoj!“

„Bruoj!“ ripetis Clemency.

„Paŝoj ekster la domo. Sonis, kvazaŭ iu desaltas de la muro.“

„Ĉu ili supre ĉiuj estas en lito?“

„Ho, nun ili ĉiuj iris dormi.“

„Ĉu vi nenion aŭdis?“

„Ne!“

Ili ambaŭ aŭskultis sed nenion aŭdis. „Mi ion diros al vi“, diris Benjamin kaj deprenis lanternon; „mi pro singardeco faros unu fojon ĉirkaŭiron ĉirkaŭ la domo, antaŭ ol mi iras dormi. Malfermu la pordon, dum mi ekbruligos la lanternon, Clemmy.“

Clemency tuj obeis, sed rimarkis al tio ĉi, ke li vane faras al si la klopodon, ke ĝi estas imago kaj tiel plu. Sinjoro Britain diris „tre povas esti“, sed tamen eliris, armita de la fero de forno kaj lumigante per la lanterno en ĉiujn flankojn.

„Estas tiel silente, kiel sur la tombejo“, diris Clemency, rigardante post li; „kaj ankaŭ preskaŭ tiel same timige!“

Rigardante returne en la kuirejon, ŝi en timego ekkriis, kiam facila figuro al ŝi proksimiĝis. „Kiu tie?“

„Silentu!“ murmuretis al ŝi ekscitite Marion. „Vi min ĉiam amis, ne vere?“

„Amis? infano! Certe!“

„Mi ĝin scias. Kaj mi povas al vi konfidi, ne vere? Mi nun havas tie ĉi preskaŭ neniun, al kiu mi povus konfidi.“

„Jes“, diris Clemency kore.

„Iu estas ekster la domo“, diris Marion kaj montris al la pordo, „kiun mi hodiaŭ vespere ankoraŭ devas vidi kaj paroli kun li. Michael Warden, pro Dio, foriru. Nun ne!“

Clemency surprizite kaj maltrankvile ekstrems, kiam sekvante la rigardon de la parolantino, ŝi ekvidis malluman figuron, starantan antaŭ la pordo.

„En minuto Vi povas esti malkaŝita,“ diris Marion. „Nun ne! Atendu, se estas eble, en ia kaŝita loko. Mi tuj venos.“ Li salutis ŝin per la mano kaj malaperis. „Ne iru dormi. Atendu min tie ĉi!“ diris Marion kun maltrankvila rapideco. „Mi jam antaŭ unu horo volis paroli kun Vi. Ho, ne perfidu min!“

Marion kaptis ekscitite ŝian manon kaj premis ĝin al la brusto — movo, kiu en sia pasio estis pli elokventa, ol la plej varmega petado per vortoj. Poste ŝi foriris, kiam la radioj de la revenanta lanterno komencis lumigadi la ĉambron.

„Ĉio trankvila kaj silenta. Neniu estas. Kredeble imago,“ diris sinjoro Britain, ferminte kaj riglante la pordon. Unu el la sekvaĵoj de viva fantazio. Ha! kio estas?“

Clemency, kiu ne povis kaŝi sian ekscititecon, pala kaj tremanta per la tuta korpo sidis sur seĝo.

„Kio estas?“ ŝi ripetis kaj frotis al si la manojn kaj kubutojn, penante trankviliĝi kaj rigardante ĉien, nur ne al li en la vizaĝon. „Estas bele de via flanko, Britain! Antaŭe vi enpelas min en teruron per bruado kaj per lanternoj kaj per Dio scias ankoraŭ kio . . . Kio estas? Ho, jes!“

„Se vi ricevas teruron de lanterno, Clemmy“, diris sinjoro Britain, tute trankvilanime ĝin estingante kaj ree pendigante, „tiam la terura fantomo estas facile forpelebla. Sed vi ja ordinare estas sufiĉe kuraĝa“, li diris kaj haltis, por ŝin atente rigardi; „kaj vi estis ja ankaŭ tute trankvila post la bruado kaj la lanterno. Kio venis al vi en la kapon? ja ne ia penso?“

Sed ĉar Clemency tute kiel ordinare deziris al li bonan nokton kaj sajn sin prepari por iri dormi, tial ankaŭ Malgrand-Britain diris al ŝi bonan nokton, farinte ankoraŭ la originalan rimarkon, ke neniu scias, kio al la virinoj povas veni en la kapon; li prenis sian kandelon kaj iris dormeme al la lito.

Kiam ĉio denove estis trankvila, Marion revenis.

„Malfermu la pordon“, ŝi diris, „kaj restu apud mi, dum mi kun li ekstere parolos.“

Kiel ajn timema ŝia agado estis, ĝi tamen montris firman kaj neŝanceleblan decidon, al kiu Clemency ne povis kontraŭstari. Ŝi mallauĉte malriglis la pordon, sed antaŭ ol ŝi turnis la ŝlosilon en la seruro, ŝi returne rigardis la junan fraŭlinon, kiu nur atendis la malfermadon, por eliri.

La vizaĝo ne estis deturnita aŭ turnita al la tero, sed rigardis ŝin plene kaj libere en floro de juneco kaj beleco. Neklara sento pri la malforta baro, kiu estas inter la feliĉa patra domo kaj la honesta amo de la bela knabino, penso pri la malĝojo en tiu ĉi domo kaj la detruo de ĝiaj plej belaj esperoj, venis en la simplan animon de Clemency kaj frapis ŝian molan koron tiel profunde, tiel forte plenigis ĝin je malĝojo kaj kunsento, ke ŝi, versante riveron da larmoj, metis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de Marion.

„Mi scias nur malmulte, kara infano“, diris Clemency, „tre malmulte; sed mi scias, ke tio ĉi ne estas bona. Pri-pensu, kion Vi faras.“

„Mi multajn fojojn ĝin pripensis“, diris Marion kviete

„Ankoraŭ unu fojon“, petegis Clemency „ĝis morgaŭ!“ Marion balancis la kapon.

„En la nomo de sinjoro Alfred“, diris Clemency, „Pro li, kiun Vi iam tiel amis!“ Ŝi kovris sian vizaĝon per la manoj kaj ripetis: „Jam!“ kvazaŭ tiu ĉi vorto disŝirus al ŝi la koron.

„Lasu min eliri“, petis Clemency. „Mi diros al li, kion Vi volas. Ne eliru tiun ĉi nokton el la pordo. Mi estas konvinkita, ke tio ĉi ne povas alporti bonon. Ha, ĝi estis tago de malfeliĉo, kiam oni tien ĉi alportis sinjoron Warden! Pensu pri Via bona patro, mia kara — pri Via fratino.“

„Mi ĝin faris“, diris Marion kaj rapide levis la kapon. „Vi ne scias, kion mi faras. Mi devas paroli kun li. Per tio ĉi, kion vi diris, vi montris vin kiel mia plej bona kaj plej fidela amikino, sed mi devas fari tiun ĉi paŝon. Ĉu vi volas min akompani, Clemency —“ ŝi kisis ŝian amikan vizaĝon — „aŭ mi devas iri sola?“

Konfuzita kaj malĝoja Clemency turnis la ŝlosilon en la seruro kaj malfermis la pordon. Marion, firme tenante la manon de la akompanantino, rapide eliris en la mallumon de la nokto.

Tie li alpaŝis al ŝi, kaj ili longe kaj multe parolis unu kun la dua; kaj la mano, per kiu ŝi tenis Clemency'n, tremis, aŭ malvarmiĝis kiel la mano de malvivulo, aŭ premis ŝin kore en la fajro de la parolado. Kiam ili revenis, li sekvis Marion'on ĝis la pordo; tie li prenis la duan manon kaj premis ĝin al siaj lipoj. Tiam li singarde foriris.

La pordo denove estis riglita kaj ŝlosita, kaj denove, ŝi staris en la patra domo. Ne depremita de la sekreto, kiun ŝi alportis, kvankam ŝi estis ankoraŭ juna, sed kun tiu esprimo sur la vizaĝo, por kiu jam antaŭe mankis al mi la nomo, kaj kiu brilis tra ŝiaj larmoj.

Ŝi ripete dankis sian pli malaltan amikino kaj konfidis al ŝi, kiel ŝi diris, plene kaj senkondiĉe. Feliĉe atinginte sian dormoĉambron, ŝi falis sur la genuojn kaj povis preĝi, havante sur la koro sian sekreton!

Jes, kaj ŝi povis sin levi post la preĝo tiel trankvile kaj feliĉe, klini sin super la dormantan fratino, rigardi ŝin kaj rideti — kvankam eĉ iom malgaje. Kaj kizante ŝian frunton, ŝi mallauĉte murmuretis al si, ke Grace ĉiam estis patrino por ŝi, kaj ke ŝi ŝin amas kiel infano!

Kaj ŝi povis la brakon meti al si ĉirkaŭ la kolon, kiam ŝi sin metis sur la kusenon, kaj la brako kvazaŭ konscie ĉirkaŭprenis ŝin defendante kaj amante kaj kvazaŭ murmuretis al la delikataj lipoj: Dio vin benu!

Kaj ŝi povis eĉ trankvile ekdormi, malhelpata nur de unu sonĝo, en kiu ŝi per sia senkulpa kaj tuŝanta voĉo ekkriis, ke ŝi estas tute sola kaj ke ĉiuj ŝin forgesis.

Monato baldaŭ pasas, eĉ se ĝi iras malrapide. La monato, kiu estis inter tiu ĉi nokto kaj la reveno, rapide pasis kaj forflugis, kiel pasanta nebulo.

La tago venis. Malkvieta vintra tago, kiu la malnovan domon ofte tremigadis, kvazaŭ de frosto. Tago, kiu la hejman doman internajon faras duoble kara, al la kamena angulo donas novajn agrablajojn, ĵetas ruĝetan flamon sur la vizaĝojn kolektitajn ĉirkaŭ la kameno kaj igas la grupojn ĉirkaŭ ĉiu kameno fari pli malvastan kaj pli intiman ligon kontraŭ la elementoj, kiuj ekstere sovaĝas. Kruda vintra tago, kiu la plej bone preparas por agrabla vespero, kovritaj fenestroj, afablaj amikaj vizaĝoj, muziko, ridado, dancado, luma kandelaro kaj societa plezuro!

Pri ĉio tio ĉi la doktoro zorgis, por saluti Alfredon. Ili sciis, ke li povas veni ne pli frue, ol en la nokto; kaj ili intencas, li diris, resonigi la nokton de la ĝojo, kiam li venos. Ĉiuj liaj amikoj devis esti kolektitaj. Devis manki neniam vizaĝo, kiun li konis kaj amis. Ne, ili ĉiuj devis tie ĉi esti.

Tiel gastoj estis invititaj, kaj muziko estis mendita, kaj tabloj preparitaj, kaj la salono de dancado aranĝita, kaj kun gastema malavareco estis riĉe zorgita pri ĉiu societa bezono. Ĉar estis Kristonasko kaj liaj okuloj jam longe ne vidis la anglan ilikon*) kaj ĝian malluman konstantan verdaĵon, la salono de dancado estis ornamita je tio ĉi; kaj la ruĝaj beroj sendadis al li el la malluma foliaro anglan saluton al la veno.

Ĝi estis labora tago por ĉiuj, sed por neniu tiel multe, kiel por Grace, kiu senbrue ĉie laboradis kaj estis la gaja animo de ĉiuj preparadoj. Multajn fojojn en tiu ĉi tago

*) arbo.

(kiel ankaŭ multajn fojojn en la daŭro de la monato, kiu pasis) Clemency time esplorante rigardadis Marionon. Ŝi estis eble iom pli pala, ol ordinare, sed sur ŝia vizaĝo estis ĉarma decida trankvileco, kiu faris ĝin pli aminda, ol ĉiam.

En la vespero, kiam ŝi estis vestita kaj portis en siaj haroj kronon, kiun Grace mem tien enplektis — ĝi estis la amataj floroj de Alfred, kaj tial Grace ilin elektis — tiu malnova esprimo, plena je pensoj, preskaŭ malĝoja kaj tamen tiel plena je spirito, nobla kaj feliĉa, kuŝis denove sur ŝia frunto kaj faris ŝin centoble pli ĉarma.

„La plej proksima krono, kiun mi plektos en tiujn ĉi harojn, estos la krono fianĉina“, diris Grace; „aŭ mi estas malbona profetino“.

La fratino ridetis kaj firme ŝin tenis en siaj brakoj.

„Ankoraŭ unu momenton, Grace. Ne forlasu min ankoraŭ. Ĉu vi certe scias, ke nenio al mi pli mankas?“

Tio ĉi propre ŝin tute ne interesis. Ŝi pensis pri la vizaĝo de sia fratino, kaj ŝia okulo kun ama intimeco firme sin-tenis sur ĝi.

„Mia arto plu ne povas iri, kara infano“, diris Grace; „kaj ankaŭ via beleco. Mi neniam vidis vin tiel bela, kiel nun.“

„Mi neniam sentis min tiel feliĉa“, respondis tiu ĉi.

„Jes, sed ankoraŭ pli granda feliĉo vin atendas. Apud alia tia kameno, tiel same ĉarma kaj intima, kiel tiu ĉi“, diris Grace, „baldaŭ sin trovos Alfred kun lia juna edzino.“

Ŝi denove ridetis. „Vi prezentas al vi feliĉan domecon, Grace. Mi vidas tion ĉi laŭ viaj okuloj. Mi ĝin scias, ĝi estos feliĉa, mia kara. Kiel feliĉa mi estas, ke mi ĝin scias!“

„Na“, diris la doktoro, rapide enirante. „Ĉu ni ĉiuj estas pretaj, por akcepti Alfredon? Li povas veni nur sufiĉe malfrue — ĉirkaŭ horo antaŭ noktomezo — tiel ni havas sufiĉe da tempo, por fariĝi gajaj antaŭ lia veno. Li ne devas veni antaŭ ol la glacio estos rompita. Disheligu la fajron, Britain! Lasu ĝin lumi sur la ilikon, ĝis ĝi estos tute ruĝa de flamo. Ĝi estas mondo plena je sensencaĵo, mia kateto; fidelaj amantoj kaj ĉio alia — nur sensencaĵo; sed ni estu sensencaj kune kun la aliaj homoj kaj ni donu al nia fidela amanto furiozan saluton al la veno. Je mia vorto!“ diris la doktoro kaj rigardis siajn filinojn kun fiera ĝojo, „hodiaŭ vespere mi ekster ĉiu alia sensencaĵo preskaŭ pensas, ke mi estas patro de du belaj filinoj.“

„Kaj ĉion, kion unu el ili iam faris aŭ ankoraŭ povas fari, por vin malĝojigi, kara patro“, diris Marion, „tion pardonu al ŝi nun, kiam ŝia koro estas plena. Diru, ke vi pardonas al ŝi, ke vi volas pardonon al ŝi, ke ŝi ĉiam havos parton en via amo kaj — ŝi eksilentis kaj kaŝis sian vizaĝon sur la brusto de la maljuna homo.“

„Infano, infano!“ kviete diris la doktoro. „Pardonu! kion mi bezonas pardonon? Efektive, se niaj fidelaj amantoj revenas, por fari al ni tiajn historiojn, tiam ni devas teni ilin malproksime de ni; ni devas sendi al ili renkonte kurierojn kaj lasi ilin veturi nur unu horon en tago, ĝis ni estos sufiĉe preparitaj, por ilin akcepti. Kisu min, mia kateto. Pardonu! Kia malsaĝa infano vi estas! Se vi min kvindek fojojn en tago ĉagrenus, anstataŭ tute ne, mi ĉion al vi pardonus, ekster tia peto. Kisu min, mia kateto. Prenu! por la estinteco kaj estonteco — pura kalkulo inter ni. Disheligu la fajron! Ĉu la homoj en la malvarma Decembra nokto devas frostiĝi? Faru lume, varme kaj gaje, aŭ mi al tiu kaj alia certe ne pardonos!“

Tiel bonhumora kaj gaja estis la doktoro! Kaj la fajro estis disheligita, kaj la kandeloj lume brilis, kaj gastoj venadis, kaj gaja movado komenciĝis, kaj ĉarma tono de ĝoja ekscititeco jam regis en la tuta domo.

Ĉiam pli kaj pli da gastoj venis. Lumaj okuloj salutadis Marionon; ridetantaj lipoj deziradis al ŝi feliĉon; saĝaj

patrinoj ludadis kun la ventumilo kaj esprimadis la esperon, ke ŝi ne estos tro juna kaj facilanima por la doma vivo; flamaj patroj falis en malfavoron, ĉar ili tro multe admiradis ŝian belecon; filinoj ŝin enviis, filoj enviis lin; multaj enamitaj paroj uzis la okazon; ĉiuj estis plenaj je partoprenado, ekscititeco kaj atendado.

Sinjoro Craggs kaj sinjorino Craggs venis brako sub brako, sed sinjorino Snitchey venis sola. „Mia Dio, kie Vi havas Vian edzon?“ demandis la doktoro.

La paradiza birdo sur la turbano de sinjorino Snitchey tremis, kvazaŭ ĝi denove viviĝis, kiam ŝi diris, ke tion ĉi certe scias sinjoro Craggs. Al ŝi ili tion ĉi neniam diras.

„La malbenita ekspedejo“, diris sinjoro Craggs.

„Mi volus, ke ĝi forbrulu ĝis la fundamento“, ĝemis sinjorino Snitchey.

„Li estas — li estas — malgranda negocia afero iom fortenas mian kompanianon“, diris sinjoro Craggs kaj maltrankvile rigardis ĉirkaŭen.

„Ho, ho! Negocia afero! Ne volu min tion ĉi kredigi!“ diris sinjorino Snitchey.

„Ni scias, kio ĝi estas, negocia afero“, diris sinjorino Craggs.

Sed ĉar ili tion ĉi ne sciis, tio eble estis la kaŭzo, kial la paradiza birdo de sinjorino Snitchey tiel minace tremis kaj ĉiuj apartaj partoj de la orelingoj de sinjorino Craggs sonis, kiel malgrandaj soniloj.

„Mi miras, ke vi povis veni, Craggs“, diris lia edzino.

„Sinjoro Craggs sentas sin feliĉa, certe“, diris sinjorino Snitchey.

„La ekspedejo tiel okupas ilian tutan tempon“, diris sinjorino Craggs.

„Persono, kiu havas negocon, propre tute ne devas edziĝi“, diris sinjorino Snitchey.

Poste sinjorino Snitchey diris al ŝi mem, ke la rigardo, kun kiu ŝi tion ĉi diris, trafis Craggs-on en la profundon de la koro kaj ke li tion ĉi sentas, kaj sinjorino Craggs rimarkis al sia edzo, ke Snitchey lin trompas post la dorso kaj ke li tion ĉi vidos, kiam estos tro malfrue.

Sed sinjoro Craggs, ne tre turnante atenton sur tiujn ĉi rimarkojn, ĉiam ankoraŭ maltrankvile rigardadis ĉirkaŭen, ĝis lia okulo trafis Grace'n, kiun li tuj salutis.

„Bonan tagon, sinjorino“, diris Craggs. „Vi estas belega. Via — fraŭlino Via fratino, fraŭlino Marion estas —“

„Ho, ŝi estas tute sana, sinjoro Craggs.“

„Jes — mi — ĉu ŝi estas tie ĉi?“ demandis Craggs.

„Tie ĉi! Ĉu Vi ŝin tie ne vidas? Ŝi nun komencas dancan“, diris Grace.

Sinjoro Craggs surmetis la okulvitrojn por pli bone vidi, rigardis Marionon kelkan tempon, tuis kaj metis la okulvitrojn kun kontenta mieno returne en la ingon kaj en la poŝon.

Nun eksonis la muziko kaj la dancado komenciĝis. La hela fajro gaje krakadis kaj saltadis, kvazaŭ ĝi el granda ĝojo mem volus danci. De tempo al tempo ĝi ridadis, kvazaŭ ĝi volus ankaŭ fari muzikon. Iafoje ĝi briladis kaj ruĝe flamadis, kvazaŭ ĝi estus la okulo de la malnova ĉambro, kaj iafoje tiu ĉi okulo ruze okuladis, kiel gaja maljunulo, kiam li vidas, kiel la pli junaj murmuretas en la anguloj. Iafoje ĝi incitante ludadis kun la branĉoj de la iliko; kaj kiam ĝia saltanta lumo faladis sur la mallumajn foliojn, ĝi elrigardadis, kvazaŭ ili denove staras ekstere en la malvarma vintra nokto kaj tremas de la vento. Iafoje ĝia humoro fariĝadis tute sovaĝa kaj petola kaj transiradis ĉiujn limojn, kaj tiam ĝi laŭte ridante ŝutadis inter la dancantojn pluvon da senkulpaj fajreroj kaj en sovaĝa ĝojo levadis sin en la malnovan tubon de l' kameno.

Preskaŭ jam finiĝis dua danco, kiam sinjoro Snitchey kaptis la brakon de sia kompaniano, rigardanta la dancadon.

Sinjoro Craggs eksaltis, kvazaŭ lia amiko estus fantomo.

„Ĉu li foriris?“ li demandis.

„Silente!“ diris Snitchey. „Li estis ĉe mi pli ol tri horojn. Li ĉion trarigardis kaj volis precizan kalkulon. Li — Ahem!“

La danco finiĝis. Marion preteriris tre proksime preter li, kiam li parolis. Ŝi rimarkis nek lin nek lian kompanianon, sed rigardadis sur sian fratinton en la fino de la salono, kiam tiu malrapide paŝadis tra la sin puŝanta amaso kaj malaperis el ŝiaj okuloj.

„Vi vidas, ĉio estas bone kaj ĝuste,“ diris sinjoro Craggs. „Li jam pli ne parolis pri tio, mi pensas?“

„Ĝe ne unu vorton!“

„Kaj ĉu li efektive estas for? kaj ekster danĝero?“

„Li tenas sian vorton. En sia ŝelo de nukso li kun la defluo de la akvo veturas malsupren de la rivero kaj kun veloj sub la vento li naĝas en tiu ĉi malluma nokto al la maro. Li ja estas konata riskemulo. La defluo, li diris, en tiu ĉi tempo komenciĝas unu horon antaŭ noktomezo. Mi ĝojas, ke ĝi estas finita!“ Sinjoro Snitchey viŝis al si la ŝviton de la vizaĝo, kiu elrigardis tute ruĝa kaj ekscitita.

„Kion Vi pensas,“ diris Craggs, „pri la —“

„Silente!“ avertis lia singarda kompaniano kaj rigardis rekte antaŭen. „Mi Vin komprenas. Parolu nenian nomon kaj ne lasu rimarki, ke ni parolas pri sekretoj. Mi ne scias, kion ni devas pensi; kaj por diri al Vi la veron, ĝi nun estas por mi tute egala. Ĝi estas vera faciligo. Mi pensas, ke lia sinamo lin trompis. Eble la knabino ankaŭ iom koketis; tiel ĝi ŝajnas. Ĉu Alfred estas tie ĉi?“

„Ankoraŭ ne,“ diris sinjoro Craggs, „oni lin atendas ĉiun minuton“.

„Bone,“ — sinjoro Snitchey denove viŝis al si la frunton — „ĝi estas granda faciligo. Mi neniam ankoraŭ estis tiel maltrankvila de la tago, kiam ni komencis nian kompanion. Mi intencas nun ĝui la vesperon, sinjoro Craggs.“

Sinjorino Craggs kaj sinjorino Snitchey aliris al ili, kiam li elparolis sian intencon. La birdo paradiza estis en granda eksciteco, kaj la soniletoj laŭte sonis.

„Ĉiuj parolis pri tio ĉi, sinjoro Snitchey. Mi esperas, ke la negoco estas kontentigita?“

„Per kio kontentigita, mia kara?“ demandis sinjoro Snitchey.

„Ke sendefenda virino estis elmetita al la mokado kaj preparolado de la mondo“, respondis lia edzino. „Tio ĉi estas tute laŭ la naturo de la negoco, tio ĉi estas vera.“

„Mi jam tiel longe kutimis,“ diris sinjorino Craggs, „vidi la negocon ligitan kun ĉio, kio detruas la doman feliĉon, ke mi jam estas kontenta, ke mi scias, ke ĝi estas la nekaŝita malamiko de nia trankvileco. Tio ĉi almenaŭ estas honesta kaj sincera.“

„Kara edzino,“ diris sinjoro Craggs, „via bona opinio estas netaksebla, sed mi neniam diris, ke la negoco estas la malamiko de via trankvileco.“

„Ne,“ respondis sinjorino Craggs kaj skuis siajn soniletojn. „Ne, vi ĝin certe ne diris. Vi fariĝus ne inda je la negoco, se vi havus tiun ĉi sincerecon.“

„Kio tuŝas mian foreston hodiaŭ vespere, mia kara“, diris sinjoro Snitchey, donante la brakon al sia edzino, „la malfeliĉo estis tute sur mia flanko; sed, kiel sinjoro Craggs scias . . .“

Sinjorino Snitchey ne lasis fini la komplimenton, ĉar ŝi tiris sian edzon flanken kaj postulis rigardi tiun ĉi homon, fari al ŝi la komplezon kaj rigardi lin.

„Kiun, kara edzino?“ demandis sinjoro Snitchey.

„La kolegon de via vivo; mi kompreneble ĝi ne estas al vi, sinjoro Snitchey,“ ĝemis sinjorino Snitchey.

„No, mi petas vin, kara edzino,“ konsolis ŝia edzo.

„Ne, ne,“ diris sinjorino Snitchey kun majesta rideto.

„Mi konas mian pozicion. Rigardu lin, la kolegon de via vivo, vian modelon, la konservanton de viaj sekretoj, la homon, al kiu vi konfidis, vian duan „mem“ —

Sekvante la rigardon de sia edzino, Snitchey rigardis sian kompanianon.

„Se vi tiun ĉi vesperon povas rigardi al tiu ĉi homo en la okulojn,“ daŭrigis sinjorino Snitchey, „kaj ne scias, ke vi estas trompita, ke vi fariĝis ofero de liaj intrigoj, sklavo de lia volo, per ia neklarigebla sorĉo, de kiu mi vin vane avertadis, — tiam mi povas nur diri: mi vin bedaŭras!“

En tiu sama minuto sinjorino Craggs regalis per tondra parolo sinjoron Craggs. Kiel ĝi estas nur ebla, ŝi demandis, ke li al sia Snitchey tiel blinde povas konfidi? Ĉu li volas kredigi, ke li ne vidis, kiel Snitchey eniris kaj kiel sur lia vizaĝo kuŝis ruzo, intrigo kaj perfido? Ĉu li povas nei, ke jam la maniero, en kiu tiu viŝis al si la frunton kaj maltrankvile rigardadis ĉirkaŭen, montras, ke io peze kuŝas sur la konscienco de lia Snitchey, se lia Snitchey entute havas konsciencon? Ĉu eble aliaj personoj ankaŭ, kiel lia Snitchey, venas al festaj vesperoj kiel malkvietaj rabistoj? — kio cetera estis ne tute prospera komparo, ĉar li venis tra la pordo tre mallaŭte. Kaj ĉu li efektive en hela luma tago (estis preskaŭ noktomezo) volas persisti defendi kaj subteni sian Snitchey kontraŭ ĉia videblaĵo kaj prudento kaj kontraŭ ĉia sperto de la mondo?

Nek Snitchey nek Craggs trovis utile batali malkaŝe kontraŭ la fluo de tiu ĉi kolero, sed ambaŭ kontentigis sin trankvile naĝi kune kun la fluo, ĝis ĝia forto malgrandiĝos, kio efektive fariĝis en la minuto, kiam oni komencis novan dancon. Tiun ĉi okazon uzis sinjoro Snitchey, por peti de sinjorino Craggs ŝian manon, dum sinjoro Craggs estis tiel galanta kaj invitis sinjorinon Snitchey. La sinjorinoj, post kelkaj facilaj deflankigoj — kiel ekzemple: „kial Vi ne invitas alian?“ aŭ: „mi scias, ke Vi estos kontenta, se mi rifuzos,“ aŭ: „mi miras, ke Vi ekster la ekspedejo povas danci,“ (tiu ĉi jam ŝercante) — favore konsentis kaj komencis la dancon.

(Daŭrigo venos.)

Vizito de la steloj sur la tero.

Ĉiuj steloj ekdecidis

Ekvojaĝi ŝur la teron.

Al mastrino ili diris

Sian volon kaj esperon:

„Ni ja tie tre mallonge

Gastos — unu, du monatojn;

Ni vizitos regnon homan,

Vidos niajn koramatojn . . .“

Sed mastrino al la steloj

Tiam donis la respondon:

„Restu tie ĉi en domo —

Vi malbenos poste mondon!“

Saĝajn vortojn ne aŭskultis

Tamen steloj la trudemaj,

Kaj senĉese ili tedis

La mastrinon — nespertemaj:

„Sed komprenu nin, mastrino,

Sur ĉielo ni sidante

Tute ja ne konas tiujn,

Kiuj kantas nin konstante!

Ĉiu ja el ni sur tero

Havas siajn adorantojn,

Kiuj sendas al ĉielo

Himnojn, ĝemojn, amokantojn!
 — „Vere“, diris la mastrino,
 „Ili kantas Vin laŭdinde;
 Sed, Vin ili ne konante,
 Vin adoras ja — en blinde!
 Ili, dum Vi sur ĉielo,
 Ĵuras ami Vin eterne,
 Ĉar neniu ja atingos
 La kaŝitan en interne!
 Se Vi tamen volas scii
 Malfeliĉan Vian sorton,
 Iru — sed Vi rememoros
 Mian nunan patran vorton“.
 Kaj la steloj al vojaĝo
 Tuj pretigis sin kun ĝojo, —
 Kaj jen baldaŭ ili estis
 Al la tero sur la vojo . . .

* * *
 Kiam aŭdis nun la tero,
 Ke atendas ĝin honoro,
 Ĉie en plej dolĉaj tremoj
 Tuj ekbatis homa koro.
 Tuta tera junularo
 De la ĝoj' ne sciis finon
 Kaj sen pacienc' atendis
 Ĉiu sian amatinon.
 Ĉiu kantis, ĉiu saltis
 Kun feliĉ' en la mieno,
 Ke li havos de proksime
 „Sin“ en sia ĉirkaŭpreno.
 Ĉiu homo dankas Dion,
 Ĉiu benas la ĉielon,
 Ke li fine nun ekkonos
 Sian karan, sian stelon!

* * *
 Dum la tera junularo
 Estas plena de espero,
 Belaj steloj de l' ĉielo
 Alveturis al la tero.
 Tuj sin ili jam dismetis
 En plej granda la hotelo . . .
 Ĝis vespero ĉe la pordoj
 Ĉiuj staris — sed sen celo.
 Je l' vespero ili aŭdis,
 Ke gastinoj la belegaj
 Morgaŭ montros sin matene,
 Nun estante tro lacegaj.
 Tiam tre malĝojigitaj
 Ĉiuj iris for la domon;
 Post mallonge la Morfeo
 Ĉirkaŭprenis ĉiun homon.
 Kio estis en la sonĝo,
 Ni priskribi eĉ ne provos,
 Ĉar ni sentas, ke precize
 Tion fari ni ne povos.
 Ni en tiu ĉi loketo
 Lom nur priskribi volas,
 Kiel . . . tamen tss! — mi aŭdas,
 Oni el la sonĝ' parolas:
 „Ho, vi! . . . ho, vi! . . . mia bela,
 Mia kara, ho, Heleno! . . .
 Viaj kisoj kaj karesoj“
 Unu preĝas al kusenon.
 Kaj alia, flamemulo,
 Sin jam havas ĉe l' altaro,
 Kaj solene — en la lito —

Sonas ĵura promesaro . . .
 — „Ho! . . . karega . . . ho, anĝelo,
 Fianĉino . . . ho, Mario! . . .
 Mia vi nun je eterne,
 Antaŭ homoj, antaŭ Dio!“
 Tiel li karesas, ĵuras
 Amon veran kaj brulantan,
 Tiel kisas tiu homo . . .
 Lampon apud li starantan.
 Sed subite al li ŝajnas,
 Ke Marion iu tenas
 Ĉirkaŭprene! . . . „Ho, pro Dio! . . .“
 (Lampon tuj diabloj prenas).
 Kaj cetere, kaj cetere
 Daŭris tio ĝis mateno. —
 Elrapidas el la domo
 Ĉiu fresa kun mieno.
 La gastinojn de l' hotelo
 Ni jam vidas sur la stratoj,
 Kaj jen baldaŭ promenadas
 Brak' en brak' la geamatoj . . .
 Sed neniu tie aŭdas
 De la amo dolĉan vorton!
 Ĉiu el la junularo
 Nun malbenas sian sorton! . . .

* * *
 Kio faris tian ŝanĝon,
 Ke antaŭe tre amataj
 Steloj, tiel deziritaj —
 Nune estas malbenataj?
 Kio faris, Vi demandas,
 Tian ŝanĝon nun subitan?
 Kio kaŭzis malfeliĉon
 Kaj esperon renversitan?
 Ĉefa kaŭzo, ke malbenoj
 Nun el ĉies buŝo sonis,
 Estas — ke la „stelon“ ĉiu
 Pli proksime, pli ekkonis

* * *
 Ĉiuj steloj ofenditaj
 Forveturis la ĉielon
 Kaj post kelkaj larĝaj tagoj
 Jam atingis sian celon.
 — „Saĝa nia stelmastrino!
 Sankta estis via vorto!
 Prenu nun la tutan teron.
 La diabloj kaj la morto! . . .
 Tamen kiel vi, mastrino,
 Antaŭsentis nian sorton?
 Kio gvidis viŝan saĝan
 Kaj profetan vian vorton?“
 — „Se Vin iu ne rigardas
 Tra ĉielaj tra speguloj,
 Sed rigardas Vin per sorbaj
 Ne trompantaj sin okuloj, —
 Tiu vidos ja sendube,
 Ke amata lia „stelo“
 Estas sen la luma krono
 Nur diablo — ne anĝelo“.

Fez.

Anoncoj.

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Septembro 1891.

№	Nomo de l' verko:	Kosto:
1.	D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa)	15 kopekoj
2.	— Jezyk Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola)	15 kop.
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca)	20 kop.
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana)	20 kop.
5.	R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla)	20 kop.
6.	D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj	3 kop.
7.	— por Poloj	3 kop.
8.	— por Francoj	3 kop.
9.	— por Germanoj	3 kop.
10.	— por Angloj	3 kop.
11.	D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto)	25 kop.
12.	D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto)	10 kop.
13.	Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea)	20 kop.
14.	A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto)	15 kop.
15.	L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto	50 kop.
16.	N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“	25 kop.
17.	D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia	1 rublo.
18.	N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro“	10 kop.
19.	A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto)	15 kop.
20.	L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia	25 kop.
21.	D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana	25 kop.
22.	Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator	50 kop.
23.	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana	20 kop.
24.	G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationalt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda)	20 kop.
25.	A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget	25 kop.
26.	E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana	3 kop.
27.	G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda	3 kop.
28.	Klubo Nürnberg. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein	25 kop.
29.	R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch)	60 kop.
30.	E. de Wahl. Princino Mary. Rakonto de Lernontor (en Esperanto). Kajero No. 1	25 kop.
31.	Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1	10 kop.
32.	Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana	3 kop.
33.	Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana)	25 kop.
34.	M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara)	50 kop.
35.	Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala)	25 kop.
36.	J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana)	20 kop.
37.	A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto)	30 kop.
38.	A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita)	
39.	Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinarodni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema)	25 kop.
40.	D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta)	20 kop.
41.	L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj)	10 kop.
42.	Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia	25 kop.
43.	Die Weltsprache Esperanto. Vollständiges Lehrbuch nebst 2 Wörterbüchern (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Germanoj)	10 kop.
44.	A. Grabowski. La Nova Jaro, de Boleslaw Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz	20 kop.
45.	Ludwig Meier. La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto	60 kop.
46.	V. V. de Maynov. Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj, de K. R.	25 kop.
47.	A. Dombrovski. Lingvo internacia de Dro Esperanto, eldono litova. Mokintuve terptautiszkos kalbos Dro Esperanto	15 kop.
48.	V. B. Parolo pri la lingvo Esperanto, havita en la Muroma Muzika-Drama Societo (en lingvo rusa)	3 kop.
49.	I. Lojko. 50 Elektitaj Fabloj de Ezopo (en Esperanto)	20 kop.

Vladimir Vladimirovič de Maynov

senpage instruas la lingvon Esperanto per korespondado (oni devas pagi lian respondon). Lia adreso: Rusujo, S. Peterburgo, Poŝtamt, poste restante.

Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-international.

Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de la presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**

... Kosto 50 pfenigoj. ...